MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 11

NOVEMBRO 2024 Kol. 472/40

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Eŭropa Tago de Lingvoj, Konferenco ĈEA,
5-a Virtuala Movada Foiro, Formikoj kiel savo,
115 jaroj de Esperanto en Pardubice, Forpasis Stanislav Krajíček

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Eŭropa Tago de Lingvoj

La 25-an de septembro E-Klubo de Dr. Schulhof havis la eblon prezenti Esperanton al publiko dum la aranĝo Eŭropa tago de Lingvoj, kiu okazis en la Biblioteka Centro en Pardubice. La

programo estis destinita por bazlernejaj lernantoj kaj partoprenis ĝin ses grupoj po 15 lernantoj. Ladislav Hakl kaj Stanislava Nováková rakontis al la interesiĝantoj pri la historio de Esperanto, pri ĝia disvastigo en la mondo kaj pri bazoj de la gramatiko. La reagoj de la lernantoj estis pozitivaj, por la plimulto de ili tio estis ilia unua enkonduko al Esperanto.
Ĉar la partopreno de la E-klubo dum la Eŭropa Tago de Lingvoj estis sukcesa, la organizanto (Eŭrope Direct Pardubice) al la klubo proponis pluan partoprenon dum similaj aranĝoj, ekz. en la universitato.

S. Nováková

Konferenco de ĈEA en Česká Třebová

La konferenco de ĈEA okazis ĉi-foje en la urbo Česká Třebová en Orienta Bohemio la 27-a ĝis 29-a de septembro 2024. La

historio de la urbo devenas de la 13-a jarcentro. Kun siaj 16 mil loĝantoj ĝi estas unu el la plej grandaj en la regiono. Dum la konferenco oni havis la okazon viziti la romanikan Rotondon de St. Katerino kaj la urban muzeon, kie krom aliaj interesaĵoj eblas vidi ankaŭ ekspozicion pri triradaj aŭtomobiloj „Velorex“, kiuj estis produktitaj ĝuste ĉi tie. Dum la konferenco estis krom kutimaj konferencaj programeroj rakontado pri la ĉi-jara UK en Aruŝo en Afriko, kaj ĉefe informado pri la UK okazonta en Brno en la jaro 2025. Interesa estis la prelego de s-ro Petr Chrdle: „Kiel informi pri Esperanto“. Fine oni interŝanĝis informojn pri agadoj en unuopaj kluboj. La partoprenantoj de la konferenco promesis klopodi plibonigi siajn sciojn de Esperanto, ekzemple pere de la nova marda Reta-Babilado:

https://meet.ji.si/...eta.babilado. Stáňa Nováková

5-a Virtuala Mov. Foiro: 28.11. – 1.12. 2024

Kara Esperanto-aktivulo, gvidanto de Esperanto-organizo, -grupo aŭ -iniciato, la Virtuala Movada Foiro (ViMF) estas por vi! La 5-a ViMF okazos ĉiutage dum la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), tio estas inter la 28-a de novembro kaj la 1-a de decembro 2024, laŭ du horaroj, de la 08:00 ĝis la 12:00 UTC kaj de la 18:00 ĝis la 22:00 UTC por ampleksi pli da horzonoj - samkiel la pasintjaraj ViMF, en kiuj vi partoprenis!

Aligi vian organizon, grupon aŭ iniciaton al la 5-a ViMF samkiel proponi programeron por la kerna programo de la 5-a VK eblas pere de la formularoj ĉe:

https://vk.esperanto.net/2024/programo - tie vi trovos la specifajn formularojn kaj ĉiujn detalojn.
Ni notu, ke proponantoj kaj partoprenontoj en la Virtuala Movada Foiro nepre devas esti aliĝintoj al la 5-a VK. Aliĝu al la 5-a VK per https://vk.esperanto.net/2024/aligxilo - se oni estas individua membro de UEA, eblas aliĝi senpage al la VK ĝis la 13-a de novembro. Poste aplikiĝos simbola kotizo. Se oni ne estas aktuala individua membro, estas speciala oferto: tra la VK-aliĝilo oni povas aliĝi en UEA por 2025 kaj gajni senpage bazan membrecon en UEA por 2024 + tujan aliĝon en la 5-a VK! Vi bonvenas diskonigi la VK-n al viaj konatuloj! Okaze de duboj, skribu al info@vk.esperanto.net.
Antaŭĝoje pro via partopreno,
Fernando Maia Jr.
Universala Esperanto-Asocio | Vicprezidanto
Subtenu la laboron de UEA per membriĝo:
https://uea.org/alighoj/alighilo

Formikoj kiel savo

Entute sur la Tero vivas dudek bilionoj da formikoj. Tio signifas, ke por ĉiu homo sur la Tero estas nekredeblaj du milionoj kaj duono da formikoj. Sciencistoj trovis, ke ĉi tiuj insektoj helpas la maturiĝon de agrikulturaj plantoj pli bone ol la artefaritaj sterkoj, protektas nian ekosistemon kaj estas fortaj indikiloj de klimata ŝanĝo.

Sciencistoj, kiuj esploras ĉi tiun nekredeble rezistan specion de insektoj, en antaŭnelonge farita studo atentigis, ke ili estas laŭvorte inĝenieroj de ekosistemo. Iliaj ampleksaj socioj havas

multe pli grandan influon al la ĉirkaŭa naturo, ol ankoraŭ antaŭ nelonge iu ajn kuraĝus supozi.

De formikoj ni povas lerni rezistecon kaj kapablon adaptiĝi al ŝanĝoj. Ilia grandega forto estas en tio, kiel ili kapablas komuniki kaj kunlabori.

Formikoj kapablas malkompaktigi la teron eĉ pli fajne kaj pli zorgeme ol lumbrikoj aŭ talpoj. Ili konstruas siajn nestojn en la tero tiel, ke en ĝi ili kreas koridoretojn. Tio certigas, ke estas en la tero sufiĉe da spaco kaj tial ankaŭ da aero. Kolonioj de formikoj bezonas multe da manĝaĵo, kiun ili stokas en formikejoj, kaj la tero estas nature sterkata. Iliaj ekskrementoj kaj restoj de manĝaĵoj ŝanĝas la grundon de acida al neŭtrala. Ili kapablas dum relative mallonga tempo tute recikligi ekzemple kadavron de kapreolino aŭ apro. Tiamaniere ili purigas sian ĉirkaŭaĵon kaj redonas nutroelementojn en la grundon.

La formikoj bonege interkompreniĝas kun afidoj. Tiuj sekrecias el sia postaĵeto dolĉan substancon, mielroson. Tiu estas por la formikoj abunda fonto de energio. Rekompence, la formikoj transportas amikajn afidojn sur fruktarbojn aŭ florantajn plantojn, kie ili havas sufiĉe da manĝaĵo. La formikoj protektas la afidojn kontraŭ predantoj kaj translokiĝante, prenas ilin kun si al nova loko, kiam ili movas formikejon. La formikoj de la genro Atta rekte en siaj formikejoj kultivas fungon. En kameretojn kun kelklitra amplekso ili amasigas foliojn el arbaraj lignaĵoj. Tiujn ili dismaĉas je pistaĵo, de kiu ili akiras

nutroelementojn. Tiamaniere tiuj fungoj por formikoj fariĝas grava fonto de energio kaj mineraloj.

Bluaj papilioj estas la kukoloj de la insekta regno. Iliaj raŭpoj sekrecias feromonojn, kiuj imitas la odoron de formikaj larvoj. La formikoj alportas iliajn larvojn en sian formikejon, kie ili prizorgas ilin kvazaŭ siajn proprajn. En certa stadio la papiliaj larvoj komencos vori formikajn larvojn.

Formikoj dum la fondado de nova kolonio faras "nuptan flugon". Dum ĝi la maskloj fekundigas la reĝinojn. Ŝi stokas iliajn ejakulaĵon en organon fine de sia pugeto. Ŝi ĝin konservas ĉi tie dum sia tuta vivo kaj eluzas ĝin por laŭbezone fekundigi siajn ovojn. Virformiko kutime mortas nur kelkajn tagojn post la svarmado.

La laboristinoj kaj la formik-batalantoj transvivas kelkajn jarojn. La reĝino vivas eĉ pli ol dudek jarojn. Dum sia vivo ŝi kapablas produkti ĝis cent milionojn da idoj.

Formikoj plej ofte komunikas helpe de feromonoj, kiujn ili sekrecias. Ili tiamaniere povas komuniki ĝis dudek simplajn informojn kaj instrukciojn. Formikoj estas unu el plej sukcesaj, plej rezistemaj kaj plej bone adapteblaj bestospecioj. Ni povas timi ilin, ni povas malŝati ilin, sed plej bone ni faros, se ni lernos de ili.

El la ĉeĥa ĵurnalo Květy (Floroj) tradukis Eva Pazourková

El la redakcio:

115 jaroj da Esperanto en Pardubice

La Esperanto-rondeto en Pardubice estis fondita en 1909, ĝuste antaŭ 115 jaroj. La plej grava membro de la origina rondo estis MUDr. Stanislav Schulhof, tre talenta homo, patrioto kaj filantropo. Li estis aktiva kiel ĵurnalisto, dramisto, redaktisto, verkisto kaj poeto. Li mortis en 1919 kaj lia tombo estas en la juda tombejo en Pardubice apud la tombo de lia amiko JUDr. Vohryzek.

En la jaro 1921, kiam okazis la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, la klubo Pardubice adoptis la novan nomon Esperanto - klubo Dr. Schulhof. Dum la Dua Mondmilito, la klubo estis likvidita kaj ĝiaj agadoj estis malpermesitaj. Tuj post la milito la klubo reviviĝis kaj ĝia agado estis renovigita sub diversaj fondintoj kaj nomoj, kaj nur sub gvido de Jarmila Rýznarová (antaŭe Rybáčková) en la jaro 1991 la Esperanto-rondeto reprenis la tradician nomon Esperanto - Klubo Dr. Schulhof.

La foto de lia tombo kaj la cindrourno.

Forpasis Stanislav Krajíček

La 29-an de septembro 2024 subite kaj neatendite forpasis en la aĝo de 68 jaroj la praga pentristo kaj esperantisto Stanislav Krajíček. En Esperantujo li konatas sub la arta alinomo PANO (ĉar lia familia nomo signifas en la ĉeĥa lingvo „pantranĉaĵeto“). Li estas aŭtoro de ĉ. 1200 verkoj kaj sendube apartenas al la rimarkindaj vidartistoj, meritanta diskonigon de la sia verkaro. Li rememorindas ne nur kiel kreema, sed precipe bonkora, amikema kaj afabla homo. En Esperantujo en 1998 li estis unu el la kunfondintoj kaj aktivaj membroj de la praga klubo E-mental', kiu apartenas sendube al la plej agemaj, eĉ internaciskale. En 2014 li grave meritis pri renovigo de la Esperanto-monumento antaŭ la Kongresa Centro en Prago (la loko de la 81-a UK en 1996).

Lia neatendita kaj tro frua forpaso estas granda perdo kaj por liaj proksimuloj kaj geamikoj, kaj por Esperantujo kaj la Esperanta kulturo. Pavla Dvořáková

Honoron al lia memoro!

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.